Prezentado

Tiu ĉi reeldono de la unuaj dek numeroj de ***Etnismo*** aperas preskaŭ tridek-ses jarojn post la origina numero 1. Kiun sencon havas tiaĵo?

Pluroblan: Unue, pro la peralkohola hektografado, la originaloj de la numeroj 1 ĝis 8 estas grandparte apenaŭ plu legeblaj. Due, de tiuj kaj aro da postaj numeroj jam delonge ne plu disponeblas ekzempleroj. Trie, ĉar tiu "informilo pri etnaj problemoj" ja evoluis, tra la jardekoj, de simplega bulteneto ĝis vera revuo, iuj homoj probable ŝatus iel "flari" la historion de tiu ĉi publicaĵo iom eksterkutima en la sfero de la Internacia Lingvo kaj tiel memori diversajn eventojn el tiu vasta kampo de interetnaj rilatoj.

Jen la "etapoj" de laevoluo de tiu ĉi komunikilo:

ASPEKTO

* La amplekso kreskis de la kvarpaĝeco de numero 1 ĝis 14 paĝoj en numeroj 3, 5, 6 kaj 9.
* La paper-speco de la numeroj 1 ĝis 8 ebligis hektografadon, kiu permesis - krom la blua skribkoloro - ankaŭ verdan kaj ruĝan.
* En numero 6 estis videblaj la unuaj nigra-blankaj fotoj.
* En numero 7 videblis unuan fojon - almenaŭ du - presitaj paĝoj, kies originalojn enhavas tiu ĉi reeldono.
* De numero 1 ĝis 13, ***Etnismo*** aperis sur unuopaj duflanke skribitaj A-4-folioj, poste sur A-3-formataj folioj falditaj al A-4-formato.
* La grafika nomformo de la revutitolo restis esence sama de numero 1 ĝis numero 73, sed post numero 4 ĝi aperis pli profesiece rekreita far Hermann Behrmann.

LINGVAĴO

Rilate al la lingvaĵo kaj pli konkrete rilate al la etno-terminologio, mi ne pretendas prezenti kompletan korektoliston, sed almenaŭ aro da modifoj - jes ja: pli-bonigoj - okazintaj dum la pasintaj jardekoj estu menciataj ĉi tie:

* VASKOJ, EŬSKEROJ, EŬZKADI: Tiuj kaj similaj formoj estas anstataŭigitaj per formoj surbaze de la radiko EŬSK-, do EŬSKA lingvo, EŬSKOJ, EŬSKIO.
* CIGANO estas eliminita favore al ROMAO, kaj analoge al EŬSK- kaj ROMA- pli proksimaj de la tiulingvaj terminoj mi ne plu diras KORNVAL- kaj HUNGAR-, sed KERNŬEK- kaj MADJAR-, kiam temas pri la etnoj; same mi adiaŭis la nomon LAPONO kaj ekuzis SAMEO.
* La formo UKRAJNO, por nomi la landon, eksmodiĝis kaj lasis sian lokon al